

Eŭropa Bulteno

Majo 2017, Numero 170

EŬROPAJ LINGVAJ PERSPEKTIVOJ



Post Briteliro en Eŭropo iĝas ĉiam pli ofte ke en publikaj informrimedoj oni sin komencas demandi pri nelogikeco de lingva reĝimo: La angla estas ĉeflingvo de eŭropaj institucioj malgraŭ tio ke Brita ŝtato ne plu estos membro de EU, kies lingvo tio estas. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ multaj aliaj prezentas tiun demandon kaj eĉ komencas

interesiĝi pri Esperanto kiel eventuala solvo. Interalie antaŭ ne longe aperis granda objektiva artikolo pri Esperanto en la plej grava politika revuo de Germanio: Der Spiegel. Tio prezentas novajn lingvajn perspektivojn kiel objektivajn ŝancojn.

Kia estos lingva reĝimo estonte en EU?

Unua, sendube la plej verŝajna alternativo estas plua fortiĝado de la angla en sia nuna pozicio kiel labora lingvo en institucioj de EU sub la premo de la ekzistantaj faktoj. Ĉiuj internaciaj korporacioj kaj sistemoj uzas la anglan kaj ŝanĝi ion ajn estus grandega kosto por ĉiuj. Imagu nur kion devus fari ĉiuj flughavenoj kaj flugkompanioj: reinstrui novan lingon al miloj da siaj oficistoj, refari ĉiujn komputilajn programojn kaj enhavojn, reskribi ĉiujn indikojn en siaj konstruaĵoj, represi ĉiujn siajn librojn, broŝurojn, rekrei siajn dokumentojn, biletojn ktp, kaj krei apartajn specifajn terminarojn... Grandega kosto kaj laboro por anstataŭi ion kio funkcias!! Kiu farus tion propravole kaj sen batali kontraŭ tia „frenezeco“? Krome ili devus reinstrui la publikon. Kiom utilas tiuj ŝanĝoj, se publiko kiu uzas ĉion, ne konas la lingvon? Cetere, aŭdiĝas diskutoj pri enkonduko de eŭropa armeo kaj estas tuŝita la demando de ties lingvo. Kompreneble, neniu konsideras ion ajn alian krom la angla.

Dua alternativo estas ke esence restos la sama sistemo kun domina angla lingvo, sed plifortiĝos la rolo de kelkaj el la plej fortaj lingvoj kiel la franca, la germana, la itala kaj la

hispana. Tio estas tre verŝajna, sed tio kreos novajn batalojn ĉar en tiu nova pozicio volos esti ankaŭ pluraj aliaj lingvoj, minimume la pola kaj la portugala... Tiu versio dependas de preteco de unuopaj ŝtatoj pagi mem kostojn kiuj pro tio ekestos.

La lasta perspektivo, kvankam plej malverŝajna, tamen iĝas ĉiam pli reala, estas neŭtrala lingvo: la diskuto okazos pri la latina kaj Esperanto.

Se tiu perspektivo estos akceptita kiel serioza eblo, tiam ĝi devos realiĝi tre laŭŝtupe. Kaj ĝuste en tio EEU trovas sian pozicion. Nome, nun kiam en la plej supera politika pozicio ni havas unu esperantiston, ni proponis al li du tiajn unuajn ŝtupojn kiujn li provu puŝi al oficialaj decidoj:

- a) Enkondukon de mini-esperanto (250 plej oftaj morfemoj) al unuaj aŭ duaj klasoj kiel antaŭobjekto por rapidigi la lernadon de aliaj fremdlingvoj (kio fakte ebligas simple sen krei grandan reziston, prezenton de avantaĝoj de E al grandaj amasoj kaj antaŭpreparon de la civitanoj ĝenerale por esti pretaj levi E-on je pli supera nivelo).
- b) Dua antaŭŝtupo estas enkonduki ĝeneralan edukobjekton pri eŭropa civitaneco en kiu parto de la instruado estus prezenti neprecon de eŭropa identeco kiu necesigas neŭtralan eŭropan simbolon: lingvon komunan kaj nur eŭropam.

Zlatko Tišljar (prelego dum KAEST 2016 en Modra-Slovakio)

STUDO KUN KLARA KONKLUDO: FRUA INSTRUADO DE LA ANGLA NE DONAS REZULTOJN



La anglan oni devus laŭeble frue eklerni – estis la ĝisnuna konvinko. Sed unu nova studo vekas dubon pri tiu ĝis nun nepridubinda dogmo. De certa aĝo laŭ tiu ĉi studo la gelernantoj kiuj komencas lerni pli malfrue havas pli bonajn rezultojn ol tiuj kiuj eklernis pli frue. Pli frua lernado de la angla en elementaj lernejoj montriĝis al la esploristoj malpli efika ol oni esperis. Infanoj kiuj komencas

lerni en la unua lernoĵaro post sep jaroj estas mapli bonaj en siaj scioj de tiu ĉi fako ol infanoj kiuj komencis lerni nur en la tria lernoĵaro. Tion montras studo en Ruhr-universitato en Bochum.

„Lernado de fremdlingvoj ekde tre frua aĝo estas plej ofte laŭdata, kvankam entute ekzistas ege malmultaj esploroj kiuj subtenas tiun miton“ – diras Nils Jäkel, instruisto de Didaktiko de la angla lingvo. Kun esploristoj el la Teknika Universitato de Dortmund ekspertoj de Bochum analizis datumojn pri 5130 gelernantoj el gimnazioj de Nordrhein-Westfalen. Oni komparis lernantajn grupojn kiuj komencis lerni la anglan en la unua kaj en la tria lernoĵaro. En la kvina klaso montriĝis tiuj infanoj pli bonaj kiuj komencis pli frue lerni. En la sepa klaso la rezultoj estis inversaj: pli bonaj estis klasanoj kiuj komencis pli malfrue. La studo konfirmas rezultojn

el aliaj landoj, ekz. el Hispanio, kiuj montras ke frua komenco kun unu aŭ du horoj semajne en elementaj lernejoj kontribuas je longa distanco nekontentigan lingvokompetenton. Verŝajna kaŭzo por tio laŭ la esploristoj estas la cirkonstanco ke la frua lernado de la angla komenciĝas en vivofazo kiam estus necesa intensa reala kontakto kun alilandanoj por ke la scio restu longdaŭre. Krome, estiĝas problemoj kiam la infanoj transire el la baza lernejo en gimnazion devas el la luda maniero lerni transiri al la gramatik-racia kun vortmemorado. La esploristoj ne intencis rekte dubigi la fruan anglalernadon. Oni ne devus pro tio havi konvinkigajn atendojn. Estus sence plimultigi en la tria klaso la kvanton da lernohoroj. La rezultoj de tiu ĉi esploro aperis en „Language Learning“.

N-TV 14.05. 2017 (Tradukis Z.T.)


RIMARGIGO PRI LA SUPRA ARTIKOLO

La teorio de kibernetika pedagogio farita baze de multaj esploroj montras ke la rapideco de la lernado (iu ajn) dependas interalie de la aĝo de lernanto. Junaj lernantoj lernas kun la plej malefika koeficiento (0.6 - 0.7) kaj ju pli aĝas la persono ĝis la matura aĝo, tiu koeficiento kreskas. Sekve ju pli juna la persono des pli malrapide li/ŝi lernas. El tio eliras simpla konstato: komencante lerni frue oni lernas malrapide kaj tiuj kiuj eklernas pli poste kiam la koeficiento kreskis, lernas pli rapide kaj rapide atingas la sciojn de tiuj kiuj komencis pli frue. Krome efikas la efekto de la antaŭscioj (propedeŭtika efekto). Pli aĝaj infanoj jam per si mem sen lerni akiris iujn antaŭsciojn per la televido, komputiloj ktp kaj do ankaŭ tio esence pliefikigas ilian lernadon. Pro tio la tre frua eklerno estas malefika kaj sensenca. Pri tio la pedagogia scienco – specife la kibernetika pedagogio, jam de longe ne dubas. Mi studis tion ĉe prof. Helmar Frank. Sed la lernsystemoj, sen konsideri la sciencon, enkondukis iom post iom en ĉiujn lernejojn tre fruan komencon, ĉar ja iuj opiniis ke tio plibonigos la rezultojn. Kaj kiel diris la intervjuito en la supra artikolo, pri tio fakte ne ekzistis sufiĉaj eksperimentoj kaj mezuroj.

Zlatko Tišljarić

AKTIVECOJ EN LA ZAMENHOF-JARO

VARSOVIA KONFERENCO OMAĜE AL LA CENTA MORTODATREVENO DE LLZ



Instituto pri kulturo „Mazowiecki“ en Varsovio gastigis tritagan konferencon por honori la memoron pri la mortodatreveno de Zamenhof inter la 28a kaj 30a de aprilo.

La konferencon aŭspiciis Ministerio pri kulturo de Pollando kaj Komisiono pri UNESCO de Pollando. Inter multaj prelegintoj estis ankaŭ Spomenka Štimec, (aŭspiciita de Ministerio pri kulturo de Kroatio.) Aparte kortuŝa estis la vizito kaj la programo antaŭ la Muzeo de la Juda

Kulturo POLIN, kiu prezentas miljaran historion de la polaj judoj. POLIN akceptis la kroatan proponon ke kadre de la programo estu legataj fragmentoj el la libro „Zamenhof-Strato“ de pola aŭtoro Roman Dobrzynski. La partoprenintoj de la programo legis el la libro antaŭ la muzeo POLIN en la pola, Esperanto, franca, germana, hungara, ĉeĥa kaj kroata.

El ĉiuj pogrameroj speciale kortuŝa estis la vizito al la tombo de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj la kultura programo ĉe la tombo. Mirindas la varsovia juda tombejo, la plej granda juda tombejo en la mondo. Post la pereado de tri milionoj da polaj judoj restis nur malmultaj homoj por flegi ĝin. Roman Dobrzynski rakontis pri la historio de la sarkofaga monumento por Zamenhof.

Spomenka Ŝtimec

PRI ZAMENHOF LIA URBO MEMORAS



Koncerto “Esperanto – la lingvo de espero” (Foto: Nina Pietuchowska)

La 12an de aprilo bjalistokaj esperantistoj, reprezentantoj de pluraj lernejoj, urbaj aŭtoritatoj kaj estroj de kultur-institucioj renkontiĝis ĉe la Zamenhof-monumento por omaĝi doktoron Zamenhof, forpasintan antaŭ 100 jaroj. Krom flormetado kaj tradicia komuna foto, la kunvenon gajigis infanoj el loka infanĝardeno, kantantaj en Esperanto, kaj la infana muzikbando *Uku-Donaco Bjalistoko*, kiu prezentis por la unua fojo *La Esperon* laŭ nova muzika komponaĵo de Lech Mazurek. La renkontiĝo estis bona okazo por danki al la urbaj reprezentantoj subtenadon de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto. Ni memorigis, ke en la nova Centro Ludoviko Zamenhof / Bjalistoka Kulturcentro ke inter la 12a kaj 14a de majo okazos la 36a Pola Esperanto-Kongreso, ke danke al urba financado ni eldonas plurajn librojn (ĉi-jare la verkaron de la bjalistoka poeto Wiesław Kazanecki), ke loka turismo-asocio organizas interesajn teatrecajn promenadojn tra Bjalistoko laŭ spuroj de Zamenhof, kaj fine ke dum la nokto de muzeoj okazos urba ludo dediĉita al Doktoro Esperanto.

El La Ondo de Esperanto

NOVA ARANĜO OMAĜE AL ZAMENHOF EN KROATIO



La 25-an de majo okazis originala aranĝo dediĉita al Zamenhof en ĉefurbo de Kroatio, Zagrebo. Kiel konate en la urbo ekzistas de la jaro 1953 la strato de Zamenhof (Zamenhofova ulica). Kroata E-Ligo organizis aranĝon ekstere, en la Zamenhofa strato. Kolektiĝis kvindekda kroataj esperantistoj kaj hazardaj pasantoj kiuj ĝuis la programon. Estis legitaj interesaj eltirajoj el la libro de Roman Dobrzynski »Zmenhofstrato« en pluraj

lingvoj kaj poste okazis altprofesia koncerto de timpanistoj Kaja Farszky kaj Nenad Sinkauz.

Pli pri tio ĉi tie: http://www.esperanto.hr/agado_zam_jaro_2017.htm#zgzamstrato

PLIA UNIVERSITATA SIMPOZIO EN CENTRA EŬROPO



Dulingva altnivela simpozio okazis en la 19a de majo 2017 en la Universitato de Vroclavo en okcidenta Pollando. La progamo daŭris kvin horojn kun dekkvino da kontribuantoj, laŭplane la duono esperantistoj kaj la alia duono polaj profesoroj. Sekve, multo bezonis sinsekvantan tradukadon, komence al la tempuzado, la posttagmezo tamen ebligis al pluraj polaj profesoroj aŭdi Esperanton, kaj konstati, ke ĝi estas parolebla kaj funkcias. La universitata revuo

anticipe aperigis artikolon pri Esperanto kaj la simpozio kaj poste aperigos duan artikolon pri la realigo.

En la malferma ceremonio bonvenigon donis la rektoro de la Vroclava Universitato, prof. dr. hab Adam Jezierski. Sekvis salutoj de du honoraj patronoj de la simpozio: por Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) prof. Reinhard Fössmeier laŭtlegis saluton de Amri Wandel, la prezidanto de AIS, kiu menciis la ĵusan statuson de Vroclavo kiel Eŭropa Urbo de la Kulturo. Por UEA salutis ĝia vic-prezidanto, kiu menciis du lastatempajn simpoziojn en la regiono, en

Poznano (PL) kaj en Timișoara (RO). Li bonvenigis la ĵusan decidon de EU doni al ukrainanoj senvizan aliron al la Unio – kio malfermas la vojon al pli kontentigaj kontaktoj inter la universitato de Luyck kaj aliaj en Eŭropo.

La esperantistaj referantoj estis Malgorzata J. Komarnicka (Mallonga historio de Esperanto kun etleciono), Stefan MacGill (Rolo de denaskaj esperantistoj), Lidia Ligeza (Poezio kaj literaturo en Esperanto), kaj Reinhard Fossmeier (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino – organizo kies celo estas mildigi la rolon de lingva diskriminacio en la scienca komunikado). Ĉiu ricevis po 20 minutojn, inkluzive kelkkaze de la traduktempo.

Pli frue en la 18a kaj 19a de majo okazis la 34a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La temoj inkluzivis prezentaĵon pri la baldaŭ finiĝanta Jaro de la Lernanto, kaj pri la temo de denaskismo inter esperantistoj kompare kun aliaj lingvoj. Prepara teksto disiris kun EKO 12. Kvankam neniu alia partoprenanto estis denaska esperantisto, multaj havis spertojn pri du-lingvaj familioj, aŭ vivado en lando, kie oni ne naskiĝis kaj la neformala karaktero de la seminario permesis aŭdi multajn rilatajn spertojn.

Post paŭzo sekvis pollingvaj prezentaĵoj: Prof. Adam Jezierski (Ekumena Vroclavo), Prof. Jan Miodek (La pola de la jaroj 1918-2018), Prof. Piotr Oszczanowski (Arto en Vroclavo), Prof. Janusz Degler (Muzeo de Teatro en Vroclavo), Dr hab. Joanna Subel (Muziko en Vroclavo). La tago finiĝis per resumo de la simpozio, plenumita de Barbara Despiney, dr hab. Universite Paris 1 Pantheon-Sorbonne (Francio).

En postaj tagoj sekvis kantkonkurso, en kiu partoprenis 130 personoj, diversaĝaj: infanoj, junuloj kaj personoj el la ora generacio, kiel solkantistoj kaj korusoj. La ĵurianoj juĝis nur la kantojn prezentitajn en Esperanto.

Stefan MacGill

ESPERANTO-MOVADO TROVU RIMEDOJN POR INTERESIGI SINDIKATANOJN PRI LA INTERNACIA LINGVO

LabourStart povas helpi. LabourStart estas la retpaĝaro pri novaĵoj kaj kampanjoj de la internacia sindikata movado, bazita en Londono kaj fondita en 1998. Ties 135,000 subtenantoj regule kampanjas por apogi la laboristajn rajtojn (kaj pli larĝe la homajn rajtojn) pere de iliaj retkampanjoj.

Tiuj kampanjoj aperas je ĝis 30 lingvoj, inkluzive en tiuj, kiujn vi bezonas, kiel la angla, franca, hispana kaj germana. Sed ili ĉiam aperas ankaŭ en Esperanto. Ĉar niaj sindikataj partneroj rigardas la rezultojn de niaj klopodoj, ili rimarkas la lingvon Esperanton, kiun plej ofte ili ne konas.

Por pruvi la utilecon de Esperanto, por montri ke ĝi estas vivanta lingvo parolata ĉie en la mondo, tio helpus se multe pli da esperantistoj subtenus niajn kampanjojn.

Jen listo de niaj nunaj kampanjoj en la internacia lingvo:

<https://www.labourstartcampaigns.net/actnowen.cgi?l=eo>

Ĉu vi povus elekti unu aŭ plurajn el tiuj ĉi kampanjoj kaj enskribiĝi, montrante vian subtenon?

Kaj ĉu vi povus diskonigi tiun mesaĝon en viaj organizaĵoj kaj via lando?

Notu, ke Esperanto figuras ankaŭ en niaj novaĵpaĝoj, kaj ke vi povas legi la lastajn internaciajn novaĵojn de la labormedio en la internacia lingvo ĉi tie:

<http://eo.labourstart.org>

Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti min (en la angla aŭ en Esperanto).

Eric Lee (ericlee @ labourstart.org)

UNUAMAJA PROTESTMARŜO EN BARCELONO



La neesperantistaj sindikatoj portis ĉi-jare ĉi tiun afiŝon.

Alberto Granados Orcero

BRATISLAVO BONVENIGOS EN JUNIO 2017 PLI OL 300 POLIGLOTOJN

Komence de junio (31.5 – 4.6.2017) en la Ekonomika Universitato de Bratislavo, Slovakio, okazos monda evento: poliglota kunveno www.polyglotbratislava.com/eo

Averaĝe la partoprenantoj scipovas ses lingvojn. Surprize granda proporcio de ili parolas ankaŭ Esperanton.

Ne temas pri formala konferenco, sed pri “renkontiĝo” en la laŭvorta signifo: la prelegojn akompanas interesa vespera programo, ekzemple plurlingvaj ludoj kaj kvizoj, multlingvaj koncertoj, internacia vespero, ... La poligrota tutmonda kunveno unuafoje okazis pasintjare en Berlino ĉefe organizita de la esperantistoj Chuck Smith (Usono, programisto) kaj Judith Meyer (Germanio, parolanta 13 lingvojn). Ĉi-jare la organizantoj decidis kunlabori kun Lydia Machova (Slovakio), lingva mentorado <http://www.language mentoring.com/>) kiu helpas homojn memlerni lingvojn kaj Petro Baláž (Slovakio), kunordiganto de la organizo E@I <https://eo.wikipedia.org/wiki/E@I>, kiu staras malenta ŝmultaj lingvolernaj retejoj, por transpreni la aranĝon al Bratislavo.

Petro Baláž

SOMERAJ STUDIOJ EN GREZILJONO



La somera universitato de EDE (Eŭropo – Demokratio – Esperanto) okazos fine de aŭgusto (la 26-an kaj 27-an) en kastelo Greziljono. Ni proponas al vi partopreni dum tuta semajno (21a ĝis 28a de aŭgusto) en la internacia semajno de popoldancoj, pupteatro kaj E-kursoj kun viaj infanoj aŭ genepoj. Vidu detale en <http://gresillon.org/s4>

Se vi ŝatus partopreni 7-17-tagan Esperanto-kurson dum la somera programo de Greziljono, vidu ĉi tie:

<http://gresillon.org/somero>, kaj se vi bezonas prezoredukton/subvencion, bv. skribi al bertox@free.fr

Bert Schuman

POEZIA FESTIVALO EN HISPANIO

Inter la 10-a kaj la 13-a de majo okazis en Palma de Majoroko la 19a Poezi-Festivalo de Mediteraneo, al kiu mi estis invitita por prezenti miajn poemojn en Esperanto. Entute ni estis 14 poetoj en pluraj lingvoj (angla, franca, hispana, kataluna, nepala, portugala, rumana...).

La densa programo portis nin al la mezlernejo Joan Alcover (kie ni deklamis kune kun la lernantoj), al surstrataj poezi-eventoj, al prezentado en aliaj lokoj de la insulo (mi iris al Inca), al registado de niaj versaĵoj en la Fondaĵo ACA kaj al la Festo de Poezio, en la Ĉefteatro de Palma, kie kuniĝis niaj voĉoj kun danco, pianmuziko kaj projekciitaj bildoj.

Mi ĉiam deklamis esperante. Post la prezentado en la teatro, unu el la mecenatoj de la festivalo venis al mi kaj tre pozitive asertis, ke de nun ŝia bildo pri Esperanto ŝanĝiĝis por ĉiam. Poste, ekster la teatro, majorkaj samideanoj varme akceptis min kun esperantaj flagoj.

La organiza teamo, sub la gvido de la poeto Biel Mesquida, portis nin al diversaj vidindejoj en Majoroko, kaj invitis nin al bela programero de la festivalo: neforgesebla koncerto de la hispana kantisto Paco Ibáñez. Mi tre dankas la konstantan prizorgadon, la amon, per kiu la organizantoj traktis nin ĉiujn, kaj tion, ke ili konsideris Esperanton plia verklingvo, samrange kun la ceteraj.

En siaj publikaj prezentoj, Biel Mesquida, direktoro de la festivalo, menciis, ke ni festas la jaron de Zamenhof, kaj kortuŝe parolis pri la majorkaj esperantistoj murditaj dum la enlanda milito.

Suso Moinhos

SUKCESOJ DE E-POEZIO EN DU NEESPERANTISTAJ HISPANAJ PRIPOEZIAJ REVUOJ

Caja de resistencia [<http://cajaderesistencia.cc/>] estas prestiĝa hispana ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio, kolektive kaj kunside farata kaj administrata, aperanta du fojojn jare (maje kaj oktobre). La poemoj en ĝi publikigatas nur trapasinte rigoran elektoprocezon fare de poezia juĝkomisiono. Ni e-istoj povas fieri, ke la ĉeesto en ĝi de poemoj de E-poetoj en la tri numeroj, kiuj ĝis nun vidis la lumon, konstantis. La poemoj legeblas en la originala esperanta lingvo kaj hispanen tradukitaj, apud fotoj kaj biografioj de niaj poetoj. En la unua numero, aperis poemo de nia galega bardo Suso Moinhos [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero1/moinhos/>]; en la dua, poemo de mi mem [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero2/fernandez/>]; kaj en la tria, lanĉita ĝuste hieraŭ, ĝueblas du E-poemoj de nia ĉina lirikisto Mao Zifu [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero3/zifu/>] kaj ilia hispana versio. Ĉi-okaze, aparte min honoris, krom okupiĝi pri la hispanigo de la poemoj de mia ĉina poeto-frato, ricevi el la gvida skipo de *Caja de Resistencia* gratulon kaj dankon pro la digna kaj interesa kontribuo de E-poetoj al la prestiĝo de la revuo. Kiel anim-karesa monstro de respekto al la E-poezio! Kiel bela sukceso de la E-poezio ekster Esperantujo!



faritan de la juĝkomisiono de *Caja de Resistencia*.
Sanon kaj poezion!


Mi vokas vin poezi-amajn esperantistojn tralegi la versojn de ĉiuj tri E-poetoj prezentitaj en la ret-revuo. Kaj, se vi ŝatas ilin, mi proponas al vi manifesti tion alklakante la vinjeton de koro videblan super la supra dekstra angulo de la foto de ĉiu el niaj bardoj. Tiel ni evidentigos, ke ni e-istoj ekzistas kaj ke Esperantujo aplaŭde pravigas la elekton

Humanitat Nova estas dulingva (kataluna-hispana) ĉiujara revuo pri liberecanaj kulturoj, produktita de la majorka eldonejo Calumnia. Sendube, ĉi nomo konatas al multaj el vi. Efektive, pasintjare Calumnia eldonis la esperantlingvan antologion de soci-kritika poezio *Nova mondo en niaj koroj* (akirebla i.a. ĉe Libroservo de UEA) ene de la kolekto *Revo lucida*, kreita por E-verkoj pri liberecanaj temoj. Okazas, ke ankaŭ pasintjare tiu eldonejo lanĉis la revuon *Humanitat Nova*. Kaj jam en ĝia unua numero legeblis hispanlingva artikolo pri la “verda idioma”: *El esperanto y la nueva humanidad* [Esperanto kaj la nova humaneco], aŭtorita de la madrida e-isto Pedro Sanz. Nu, en la dua numero, kiu ĵus vidis la lumon, aperas kontribuajoj de tri e-istoj. Unue, eblas legi hispanlingvan eseon de la kataluno Javier (pli konata kiel Xavi) Alcalde: *El esperanto humanista y revolucionario* [Esperanto humana kaj revolucia]. Per ĝi, Alcalde nuancas asertojn faritajn de Sanz en ties menciita teksto. Due, legeblas ses poemoj de mi mem en la originala esperanta versio kaj en mia hispanigo. La esperanta versio de kvin el ili jam antaŭe premieris en diversaj numeroj de *Sennaciulo*. Trie, ĝueblas desegno aŭtorita de la franca e-isto Serĝo Sir’, same jam publikigita en la SAT-organo kiel ilustraĵo por mia poemo *Apostolo de la Ideo*. Ekzempleroj de la revuo kaj de ĉiuj

eldonaĵoj de Calumnia mendeblas poŝte (Apartat de Correus 278, 07350 – Binissalem – Mallorca, España), retpoŝte (info[at]calumnia-edicions.net) kaj tvitere (@calumniaeditor). Tiuj samaj adresoj uzeblas por esprimi al la eldonistoj dubojn, sugestojn, kritikojn... Kaj eĉ gratulon. Bele, se multaj el vi manifestos al ili viajn ĝojon kaj dankon pro la fakto, ke ili tiel ame prizorgas Esperanton.

Miguel Fernández

ITALA-ESPERANTO-KONGRESO EN HERACLEA, POLICORO, MATERA



Ĝi okazos inter la 26-a de aŭgusto kaj 2-a de septembro.

Kiel vi scias la Itala Esperanto-Kongreso estas kongreso de kontrastoj.

Unuflanke oni invitas vin al nerezigneblaj movadaj diskutoj. Oni povas peti Osmon Buller pri ĉio rilate al la movado en la lastaj 30 jaroj (kiom estis la asocioj membroj de UEA en 1897? ĉu estas vero ke Probal Dasgupta ŝtelis ĉokoladon de volontuloj en la Centra Oficejo?) aŭ pri ĉio rilate al la nuna politika situacio en Finnlando. Same oni povas peti al Lu Wunsch-Rolshoven ĉion pri informado (ĉu ekzistas iu kapabla informi en la movado?, ĉu ĵurnalistoj pli interesiĝas pri koloro de kravatoj de Zamehof aŭ pri homaranismo?).

Aliflanke tamen la muzika, ekskursaj kaj naĝa programoj postulas, ke vi ne interesiĝu pri la profundaj movadaj temoj. Kiel vi sukcesos kunteni la tuton? Eble helpos vin la grekaj dioj, kiuj en la kongresa regiono estis (kaj ankoraŭ estas) hejmecej.

Ĉar la 31-an de majo altiĝas (por tiel diri. temas pri apenaŭa moviĝo.) la aliĝkotizoj,

iru rigardi la paĝaron

<http://kongreso.esperanto.it/84/index.htm>

kaj aliĝu antaŭ la 31-a de majo. Poste ĝis la lasta momento vi povos decidi, ĉu iri naĝi aŭ ĉu bonkondute aŭskulti movadajn saĝajn pensojn (sed ne forgesu kunporti la naĝkostumon por esti libera decidi laŭ via konscienco).

LKK

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de majo 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, N-TV, Spomenka Štimec, La Ondo de Esperanto, Stefan MacGill, Eric Lee, Alberto Granados Orcero, Petro Baláž, Bert Schuman, Suso Moinhos, Miguel Fernández, LKK de Itala E-kongreso

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

